Cena numeru 0,20 fr. szw.

# POLA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ
LA GAZETO ESTAS FIDELA AL LA BULONJA DEKLARO

„Esperantystą jest każdy, kto zna język „Esperanto“ i używa go dla jakichbądź celów“.
DEKLARACJA BULOŃSKA.

„Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas“.
BULONJA DEKLARO.

„Sądzimy, że służąc naszej Ojczyźnie, Esperanto najlepiej służyć będzie sobie“.
DEKLARACJA POZNAŃSKA.

„Ni kredas, ke servante nian Patrujon, Esperanto plej bone servos sin mem“.
POZNANJA DEKLARO.

E N H A V O:

*Stanisław Braun*: Semantoj. *Jan Kostecki:* La lingvo defendu. *Antoni Lange:* Kometo. Libroj kaj gazetoj. Esperanta Kroniko. Komunikoj.

JARO XVII WARSZAWA—OKTOBRO № 9 (95)

ELDONA SOCIETO
„Pola Esperantisto"
KOMP. KUN LIM. RESP.
Widok 19, Warszawa, Polujo.
AKCEPTAS LIBROJN, PROPAGANDILOJN KAJ ALIAJN ESPERANTAĴOJN POR KOMISIA VENDADO. SKRIBU TUJ.

Zarząd Polskiego T-wa Esperantystów w Warszawie zawiadamia, że na mocy § 13-go statutu T-wa, w dniu 24 września 1923 r. uległy wykreśleniu z listy Członków następujące osoby, zalegające w opłacie składek powyżej roku:

P. P.

1) Adamczewski Władysław
2) Bassarz Mieczysław
3) Bielecki Ignacy
4) Błażewicz Kazimierz
5) Gadziński Roman
6) Glixelli Stanisław
7) Gładzikówna Janina
8) Gostyński Władysław
9) Grzybowska Irena
10) Hejdukowski Leon
11) Hołyński Michał
12) Jarecki Juljan
13) Kinel Adam
14) Kozłowski Władysław
15) Michalska Janina
16) Muszyński Jan
17) Muszyńska Irena
18) Ostrowski Eugeniusz

P. P.

19) Poraj-Rogozińska Maryla
20) Prus-Skowrońska Marja
21) Baronowa Rozen
22) Rudzka Halina
23) Sarżant Robert
24) Smolińska Zofja
25) Szatkowska Wanda
26) Śmietański Zygmunt
27) Turlińska Zofja
28) Wądołowski Stanisław
29) Wójcicka Alina
30) Wyszogród Maurycy
31) Zaczyński Wacław
32) Zapolski Jan
33) Zawadzka Bronisława
34) Zbroziński Feliks
35) Zdunkówna Marja.

// POLA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

JARO XVII WARSZAWA — OKTOBRO 1923 J. № 9 (95)

# Semantoj.

*Ni eliras je matena horo,*
*Kiam brilas roze horizonto,*
*Plugi kampon, plugi por estonto,*
*Kio estas nia pen' — laboro.*

*Ni eliras je matena horo*
*Kaj kun spin' klinita kampon ŝiras,*
*Sub piedoj ter' libere spiras*
*Kaj ridetas al ni la aŭroro.*

*Poste semas, semas ni senlace,*
*En la nigran teron semon ĵetas —*
*La ĉielon poste ni preĝpetas,*
*Ke la kampo nia kresku pace.*

*Kiam venos de rikolt' momento,*
*Novan semon havos ni en domo*
*Kaj atendos ĝis ripozos homo*
*Por kun freŝa ĝin eksemi sento.*

*Ni eliras je matena horo,*
*Kiam roze brilas horizonto,*
*Plugi kampon, plugi por estonto,*
*Kio estas nia pen' — laboro.*

**Stanisław Braun.**

# La lingvon defendu!

Kiel scias niaj legantoj, la IV Konferenco de Pola Esperantista Societo decidis prezenti al la Nürnberga Kongreso du el la deklaroj, ĉe ĝi akceptitaj: tiun pri la neŭtraleco de nia lingvo kaj tiun pri la fideleco al la decido de Akademio kaj de Lingva Komitato pri landnomoj. Niaj bravaj poznanjaj samideanoj plenumis la faritan promeson kaj sendis la ambaŭ proponojn al la Konstanta Kongresa Komitato. La diskutado pri ili tamen ne okazis. Kial? — Kiam nia oficiala reprezentanto demandis la K. K. K. pri la sorto de niaj proponoj, oni respondis al li, ke la dua (pri landnomoj), tute ne estis metita en la tagordon, *ĉar ĝi estas lingva demando, pri kiu ne povas okupiĝi la Kongreso.* Koncerne la unuan, jes, ĝi en la tagordo troviĝas, tamen ĝia enhavo ŝajnas al K. K. K. danĝera, pro la reganta peza atmosfero internacia.—„Mi do reprenas la proponon", obeeme kaj paceme deklaris nia reprezentanto.

La atmosfero estis, efektive, peza. Forestis de la Kongreso reprezentantoj de nia granda amika Nacio Franca, kies sanga kaj mensa oferego dum la mondmilito savis de longa mallibero tiom da eŭropaj popoloj. Forestis reprezentantoj de heroa Nacio Belga, kiu sciis ĝisvenke defendi sin kontraŭ dekoble pli granda malamiko. Ili-forestis ne ĉar ili ne volis veni. Ili forestis, ĉar la ĝis nun neniam kaj por neniu fermata pordego de Esperanta Kongresejo unuafoje en la historio de nia movado brufermis sin antaŭ filoj de plej valoraj, plej noblaj, plej geniaj popoloj de la Eŭropa Kontinento. Tiu pordego tralasis tamen la delegitaron de la Sovjeta Rusujo, unika ŝtato, kiu forpelis de siaj limoj la profunde pacan, homaman, neŭtralan internacian organizaĵon de Universala Esperanto Asocio. Kontraŭ tiu senegala ŝovinismo de la Sovjetlando neniu voĉo leviĝis dum la kongreso. Mute oni akceptis la hontindaĵon, mute sidiĝis al la sama tablo kun ĝiaj spiritaj aŭtoroj.

Ni estas do kontentaj, ke niaj proponoj ne estis diskutataj en tia atmosfero. Ĉi-tie ni volas tamen demandi publike la Konstantan Kongresan Komitaton, ĉu ĝi opinias, ke postuli fidelecon al niaj lingvaj institucioj, postuli la unuecon de nia Esperanto, ke tio vere estas lingva demando, nediskutebla dum kongreso? Ĉu ne tial lingvaj demandoj estas nediskuteblaj dum kongresoj, ke pri ili decidas ja la Akademio kaj la Lingva Komitato? Se ta-

men oni ne obeas al tiuj organizoj? Ĉu por helpi ilin vi tiam malpermesas ilin defendi?

Sur p. 76 de la oficiala Kongresa Libro de la Nürnberga Kongreso, la Prezidanto de Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj, S-ro Generalo H. Sebert skribas pri nia propono:

„La Societo (Pola Esp. Societo) decidis prezenti tiun decidon (la deklaron pri landnomoj) al la voĉdono de la XV Kongreso kaj ***mi plene aprobas ĝin.*** Ĝi ***ne*** estas lingva demando... ***ĝi estas demando pri necesa disciplino en nia movado...*** ĉiuj societoj... havas la ***nepran devon*** akcepti la decidojn de la Lingva Komitato pri la lingvaj aferoj. Se ne, ***nia movado fariĝos tute anarkia*** kaj ni baldaŭ perdos la profitojn de nia organiza interkonsento".

Kion defendis la K. K. K. maldefendante la Lingvan Komitaton? Ĉu efektive ĝi estas afero de tiu falsa ambicieto de kelkaj gvidpersonoj en la utilega kaj tre serioza organizaĵo U. E. A., kiuj spite al la volo de tuta esperantistaro, spite al la bono mem de la movado daŭrigas diri: „Svisio", kaj por nenio en la mondo decidiĝus elbuŝigi: „Svisujo"?...

Tio ja memorigas la fabelon, kiun en mia lando oni rakontas al disputemaj infanoj.—Edzo kaj edzino dum promenado ekvidis nigran hundinon, al kiu oni tranĉis la hararon. Li diras: „Razita!" ŝi: „Tondita".—Razita!—Tondita! – Ili koleras pli kaj pli. Fine la edzo ekkaptas la virinon kaj enigas ŝin en la apudan riveron. Sed tiam ankoraŭ, tute kovrita per akvo, ŝi eltiras super ĝi la manon kaj per du fingroj faras signon, similan al movo de tondilo.

Nia propono, lingva, se oni volas, celis nenion alian, ol la regulo laŭ kiu oni ĝin malpermesis: la firmigon de la aŭtoritato de Akademio kaj de Lingva Komitato. Ni ne proponis ja ion novan, ni ne proponis diskuti, ĉu oni devas uzi „ujo" aŭ „io", ni proponis nur obeigi la ribelulojn al decido jam farita, al la unika aŭtoritato, kiu gardas la unuecon de nia juna, atakata, persekutata, falsata kaj disrompata Esperanto. Ĉu ne sufiĉa nombro da idistoj, antidistoj, medialistoj, „ankeistoj" ĉiutage genie trakomponas nian lingvon? Ĉu ni mem devus helpi ilin? Ĉu ni tiel ankoraŭ malfortaj, tiel neaŭskultataj de la mondo, deziras mem montri, ke tiu iluzio, ke homaro parolos iam unu lingvon, estas neatingebla ĥimero? Ĉar jes, ĥimero ĝi estus, se eĉ en nia rondo ni ne povus konsenti pri la reguloj de nia idiomo. Post unu diferenco nepre sekvos pluaj, ili sekvas jam, kiel fatala rezulto de unua breĉo en la muro de lingva solidareco. ***Kelkiu, ti-kies,***

*ankore* estas idoj de sĥismo *svisia* — kaj kio okazas en la sfero de radikoj! Ĉiuflanke *ŝvebas* novaj vortoj, kiujn vane vi serĉus en oficiala radikaro, kiujn neniam komprenus esperantisto nekonanta fremdajn lingvojn, Esperanto *rivoluas* rapide al nova Babelo, al disfalo je cent diversaj „internaciaj" lingvetoj, el kiuj neniu iam la mondon akiros. Ĉiu serioza homo vidas, ke la savo estas nur tia: disciplino, obeo al la elektita aŭtoritato. Ne vivas jam Zamenhof, sed vivas la korpo, al kiu li transdonis sian majstran gvidbastonon. Submetiĝi al tiu korpo, estas plej grava devo de ĉiu, kiu deziras, ke Esperanto ne pereu.

Kaj pro kio la obstina malobeemo? Pro „uj" aŭ „io"! Ĉu por ni, kleraj homoj de XX jarcento, tiu sondiferenco estus tiel granda, ke pro ĝi ni piedpremu ĉiun aŭtoritaton, rompu la unuecon, kompromitu la ekziston mem de la lingvo? Ĉu ia diabla eliksiro estas miksita al tiu malfeliĉa „io"?

Ĉar ĝi ja ne estas demando politika, karaj sinjoroj, ĝi ne estas, eĉ se vi ĝin faras tia. „Rusujo", tutsame kiel „Rusio", povas signifi aŭ ŝovinistan, patrujon, aŭ nur pecon de tero, sur kiu sennaciecaj mondanoj ĝuas la feliĉon de komunisma sistemo. Tiu afero dependas plene de via bona plaĉo, ne de senkulpaj sonoj: „ujo" aŭ „io". Neniam la sufikso „io" en la vorto „Svisio" malpermesos ian „svisianon" esti eĉ... antisemito.

Karaj amikoj, ni estu saĝaj. Ni estu pli seriozaj. Sur la altaro de komuna bono ni sciu buĉi la ŝafidon de ofendetita ambicio. Tiu ofero purigos nian spiriton. Per ĝi ni fariĝos pli grandaj, pli indaj servantoj de la alta idealo, por kiu ni laboras.

Diferencu niaj konvinkoj politikaj kaj sociaj. Ni interdiskutu pri ili fervore. Sed en unu sfero ĉiam regu paco: neniam per difektanta mano ni tuŝu la sanktaĵon, ni tuŝu neniam la lingvon mem!

*Jan Kostecki.*

Aliaj gazetoj estas petataj represi.

ANTONI LANGE.

# KOMETO.

(El la kolekto: „En kvara dimensio“).

Estas mirige, ke depost la lasta apero de l'Halley'a kometo en la jaro 1910 forpasis pli ol sesdek jaroj, tamen neniu tion rimarkis—kaj ĉiuj traktas la aferon tiel, kvazaŭ tiuj 64 jaroj neniam estus ekzistintaj. Mi posedas tamen nerefuteblan pruvon, ke tiuj 64 jaroj estis; ke nome nia planedo transpasis la periodon 1910 — 1878 kaj poste returne 1878 —1910. Tiamaniere la tempo, forpasinta malantaŭen kaj returnen, plene egaliĝis, kio lasas sin tre facile pruvi matematike.

Tiu stranga fenomeno en la historio de l'kosmoso havis bedaŭrinde nenian influon je la historio de l'homo. Simple ĉio iris laŭ inversa linio, kiel ekz. la renversita filmo en la kinematografo. La estinteco restis neŝanĝita—kaj kvazaŭ ia fato gardis nin — ĉio okazis tute same kiel antaŭe.

Mi ne dubas, ke ankaŭ multaj aliaj homoj povis rimarki tiun fenomenon; tamen mi neniè trovis aludon pri ĝi.

Mi sola povas fakte pruvi, ke tiel estis. Mi ne diras, ke tiu revolucio okazis por mi, sed mi el ĝi iamaniere havis utilon.

Ankaŭ neniel mi povas konsenti kun la teorio de profesoro Kessington el Glasgow, kiu en la jaro 1909, ankoraŭ antaŭ la kometo, publikigis siajn opiniojn en *Astronomical Review of G. R. S. of S.* Li skribas nome, ke la kometo tute ne ekzistas; ke en certa ordiĝo de suno kaj planedoj formiĝas plektaĵo de eteraj nebuloj interglobaj, kiuj kuniĝas en neprecizigebla kaj longedaŭra lumnubo de speciala formo, nomata kometo; tiu nubo rondiras dum ia tempo en la spacoj kaj poste disiĝinte malaperas; tia ordiĝo de l'eteroj periode ripetiĝas en interspaco de certa tempo kaj tiel same ripetiĝas la apero de tiu lumnubo.

Blanchard el Parizo komencis akran polemikon kontraŭ Kessington. Li pensis argumenti la realecon de l'kometo kaj sur la bazo de spektra analizo pruvis la ekziston de kalicianido, antaŭdirante al la tuta homaro la morton pro veneniĝo.

Kiel mi scias, nenio simila okazis, tamen ankaŭ same falsa estas la teorio de Kessington. La kometo estas sendube korpo reala; kaj ĝia vosto, kvankam konsistas el

materio senlime maldensa, tamen posedas perfektan elastecon, kvazaŭ de kaŭĉuko, rilate al la teratmosfero, kiu estas kvazaŭ alia kaŭĉukpilko. Kunpuŝiĝo de tiaj du korpoj sendube devas elvoki ian efikon. Ĉe la neimageble granda movorapideco de l'kometo — ĝia kunpuŝiĝo kun la tero tute ne havas karakteron de katastrofo; ĝi estas frapo senlime forta, sed tre milda: kaŭze de tio la rezultato de la frapo estas preskaŭ nesentebla, sed daŭras tre longe. En la dirita okazo 64 jarojn.

Tial en tiu tempo, la 18-an de majo 1910, la loĝantoj de nia planedo, krom ioma timo, nenion eksentis. Anstataŭe kelkajn tagojn poste (ne tuj) kaj plue dum la tutaj 32 jaroj la homaro estis strange mirigita pro la speciala karaktero de la faktoj, kiuj okazis sur nia planedo.

La tuta afero devenas de tio, ke la kometo, frapinte atmosferon de l'tero, puŝis ĝin en direkton kontraŭan al ĝia kutima irado. La terorbito, anstataŭ antaŭen, iris malantaŭen, kaj ĉio kvazaŭ renverŝiĝis sur la tero. La homa speco estas pro sia naturo pasiva, do post kelkaj monatoj de ekmiro ĉiuj kutimiĝis al tiu returna ordo de aperaĵoj.

La plej rimarkinda apero estis en tiu periodo ne tiom la ŝanĝo de la direkto en la rondirado de l'tero, kiom la returniĝo de l'tempo. Nome la tempo komencis flui malantaŭen de morgaŭ ĝis hieraŭ, renovigante kvazaŭ fotografa kliŝo, la aperaĵojn fiksitajn en la spacoj de l'formortinta pasinteco.

Post longaj disputadoj la astronomoj ne pli frue ol en la sekvinta 1909-a jaro publikigis la kalendaron, kiu komenciĝis la 31-an de decembro kaj finiĝis la 1-an de januaro. Ankaŭ ĉiuj fenomenoj ligitaj kun la tempo komencis moviĝi laŭ returna direkto. Unue estis la sunsubiro kaj poste la sunleviĝo, antaŭe estis la rikoltoj kaj poste la semado; antaŭe la morto, poste la vivo; antaŭe la infanoj, poste la edziĝo. La reviviĝo fariĝis ĝenerala leĝo, maljunuloj reakiradis junecon kaj infanecon, edzinoj revenadis al fraŭlineco kaj infanoj malaperadis en la patrinaj sinoj, transirante al malesto. Kiu estis malliberigita, parolis: — Mi estas plenumonta post tri tagoj tian kaj tian krimon. — Hieraŭ signifis morgaŭon, morgaŭ signifis hieraŭon.

La printempo malrapide malaperadis, komenciĝis neĝoj kaj frostoj kaj en la monatoj marto-februaro ni havis sufiĉe akran vintron. Kaj samtempe mia kreditoro, kun kiu mi jam en majo reguligis la kalkulon, venis denove, postulante la redonon de l'tuta sumo kun la procentoj. En marto oni ankaŭ alportis al ni el lombardo la peltojn, kiuj

efektive tre ulitis al ni. Januaro 1910 fiksiĝis bonege en mia memoro: ni revenis de la tombejo kun la tuta funebra sekvantaro, kaj kiam mi estis hejme, oni enportis en mian ĉambron la ĉerkon, kiun oni malfermis — kaj elprenis el ĝi la kadavron de mia bopatrino. Oni metis ŝin sur la lito; post kelkaj tagoj ŝi malfermis la okulojn; komence ŝi estis malforta, sed baldaŭ reviviĝis kaj denove mi aŭdis ŝian agrablan voĉeton: — Ah, ci fripono perversa kaj diboĉa, ci pereigis mian filinon, rompis al ŝi la vivon k. t. p. Bonkora Marinjo komencis maltrankviliĝi, atentigante, ke nia malgranda Jaĉjo konstante malgrandiĝas; efektive en la fino de novembro 1909 li atingis la malplej grandan kreskon kaj iun tagon malaperis en la patrina sino. La samo okazis post unu jaro (1808) kun Aleĉjo, kaj en 1907 montriĝis, ke mi ne nur bopatrinon, sed eĉ edzinon ne havas. Mi renkontis foje Marinjon sur la strato; denove ŝi estis fraŭlino, kaj mi ŝia fianĉo. Ŝia panjo estis por mi tre dolĉa.

Mi ne povas kompreneble rakonti la tutmondan historion malantaŭen. Mi rememorigis al mi tamen la grandan movadon de la 1905 jaro kaj la 30-an de oktobro, en kiu oni proklamis la konstitucion *).

Dume jam la sekvintan tagon, dankon al Dio, la konstitucio ne plu estis kaj ni vivis en ***ancien regîme,*** kiam oni trankvile vizitadis Filharmonion kaj ludis kartojn kaj la militintendantaro faradis bonegajn negocojn.

Unu tagon la gazetportistoj vokadis sur la stratoj: Cuŝima!, alian tagon: Batalo apud Jalu! k. t. p.

Ĝuste en tiu tempo okazis al mi la sekvantaj faktoj: mian edzinon Marion tute mi ne konis, kaj la ofico, kiun mi okupis en la direkcio de karbominejo — estis nenia. Maljuna Breyer vivis kaj sidis ĉe mia skribtablo kaj mi kun la lastaj tri rubloj en la poŝo vagis tra Varsovio pripensante la disiĝon kun Jadwinjo. Unu tagon mi estis en la parko, kie sub maljuna acero mi enterigis malgrandan skatoleton kun medaljono (donaco de Jadwinjo!), cizis la daton: la 15-an de majo 1900. krom tio mi faris sur la skatolo, mem mi ne scias kial, certajn magiajn signojn, por ke tiun skatolon nek tempo, nek spaco konsumu. Subite aperis Jadwinjo, farante al mi terurajn riproĉojn pro iu Eminjo kaj maldolĉe plorante foriĝis de mi por ĉiam. Tamen la sekvintan tagon denove mi ŝin vidis, ni estis en la plej bona konsento: la tuta idilio belege disvolviĝis, ĝis fine iun tagon Jadwinjo malaperis kaj mi nenion sciis pri ŝi.

---

*) En Rusujo, post la rusa — japana milito

Ĉi tie mi rimarkas, ke antaŭe, ankoraŭ en la jaro 1910-a ofte mi rememorigadis al mi tiun ĉi momenton kaj bedaŭris la disiĝon. Suferigis min tiu neeltrinkita pokalo. La ripeto estis identa kun la antaŭa irado de faktoj, sed en la inversa direkto. Ĝuste mi transiris de la IV kurso de juro al la III, poste al la II kaj I, kaj unu tagon mi trovis min en gimnazio, transirante precize de la superaj klasoj al la malsuperaj, ĝis fine mi atingis kun gloro la preparan klason.

Tiam mi estis tre feliĉa, ĉar denove mi estis en la domo de la gepatroj, amata, dorlotata kaj senzorga. Dum Kristnasko mi ricevis belegan ĉevalon kaj post kelkaj jaroj iradis kun vartistino en ĝardenon, en mallongaj pantalonoj. Unu tagon mi ĉesis paroli kaj sciis nur balbuti: mama*)—forgesis la arton de irado, oni portadis min sur la brakoj k. t. p.

Malgraŭ la tiel mirinda kadukiĝo, mi memoris perfekte ĉion, kio okazadis antaŭe, kvankam la plimulto de homoj tute tion estis forgesinta. Venis tamen ankaŭ por mi momento de nescio kaj mallumo. Iun tagon mi malaperis for de la mondo: simple mi malestis! Kiom longe mi malestis — malfacile difini. La tempo de mia malesto ne ekzistis por mi. Ŝajnas tamen, ke tio ne daŭris longe.

Ĉi tie malgranda klarigo: frapita pilko kuras en donita direkto, sed post ia tempo rec ĝi falas teren, kio klariĝas per la leĝo de pezeco. Simile la tero, puŝita laŭ inversa orbito rondiris dum ia jarperiodo malantaŭen, ĝis ĝi iun tagon revenis al normala rondiro. La tempo revenis ankaŭ al sia normo. Laŭ scio, mi travivis malantaŭen 32 jarojn; poste venis la krepusko de malesto, kaj denove mi aperis sur la mondo. Estis la jaro 1878, kiam okazis mia rea naskiĝo.

Longe mi ne povis kompreni la analogiaĵojn de mia unua kaj dua estadoj sur la tero. Estis certa plezura monotonio en tiu ĉi ripetiĝo, kiu min treege mirigadis, kiam mi komprenis la misteron.

Konstante mi revis disvolvi mian vivon en korektita eldono, pli perfekta ol la antaŭa, sed vane: fato estas super ni kaj ni devas preskaŭ absolute ripetadi nin mem. Ĉe ĉiu okazaĵo mi parolis al mi: tio ĉi jam estis, tion mi konas, tion mi jam vidis. Tiu vartistino, kiu rakontadis al mi fabelojn, kaj tiu ligna ĉevalo kaj tiu lernejo, al kiu oni min sendadis — ĉion ĉi mi konis — jes, mi ripetas, ke estas plezuro vivi la duan fojon; domaĝe nur, ke tio oka-

*) „panjo".

zadas tiel malofte. Tiel mi ree trairis gimnazion kaj ree estis en la jurlernejo kaj ree renkontis Jadwinjon.

Depost la unua momento, kiam mi renkontis Jadwigan, io min frapis: sendube ni konis nin en la antaŭa vivo kaj sendube estis inter ni io koreca. Do ne estas mirinde, ke tuj ni sentis nin kiel malnovaj konatoj. Mi komencis do rememorigi al ŝi certajn faktojn el nia antaŭa vivo, sed Jadwiga malmulte memoris. Ĉion, kion mi diris, ŝi traktis kvazaŭ fantazion, kvankam sendube — ŝi diris — io vekiĝis en ŝi malrapide, ia rememoraĵo, tamen ĝi estis pli rememoro de songoj kaj songimagaĵoj, ol de efektivo. Nur post kelkaj semajnoj ŝi komencis konscii tiun songon: mi submetadis al ŝi la bildojn, kiujn ŝi devis rigardi en tiu songo.

Ŝi manplaŭdis, ploris kaj ridis pro miro, kiam mi ŝiajn proprajn songojn al ŝi rakontis; niajn infanajn plezurojn kaj malgajojn—niajn nunajn kisojn—kaj malpacojn, precipe la historion pro iu Emilio—kaj poste la disiĝon. Jadwinjo hontis pro tio kaj rakontis al mi siajn pluajn, kiel ŝi nomis tion, songojn. Disiĝinte de mi, ŝi koniĝis kun iu malpli juna sinjoro, kiu edziĝis je ŝi; li estis sufiĉe riĉa, sed ŝi ne trovis feliĉon en tiu ligo kaj ĉiam bedaŭris, ke ŝi min tiel subite forlasis. Tamen feliĉe — ŝi aldonis — tio estis songo. Neniam mi disiĝos de vi; ĉiam mi estos via.

Mi kisis ŝian buŝon kaj kolon, kiam subite mi ekvidis sur ŝia brusto medalionon, kaj en ĝi estis ŝia propra portreto el la junaĝo. Mi estis strange kortuŝita: mi konas ĉi medalionon; tian saman, eble la saman, ŝi iam donis al mi por rememoro. Ĉu vi rememorigas al vi tion? Tamen ja ĝuste tian saman medalionon mi enfosis en la parko sub maljuna acero. Se tiu medaliono ankoraŭ estas tie, tio signifas, ke ĉiuj miaj supozoj veriĝas.

— Ni iru en la parkon — mi diris — ni devas esplori, ĉu tiu metala skatoleto ankoraŭ troviĝas tie.

Efektive ĝi ne estis iluzio: danke al magio de miaj sentoj kaj de mia imagaĵo — la skatoleto kun la medaliono — objekto materia — superpezis la nematerian potencon de l'temporondo kaj ĝis hodiaŭ tradaŭris nedetruita.

La aliaj objektoj malaperadis laŭgrade, enirante en ian ombron de malesto kune kun la formortanta metatempo. Tiel ekz. vane mi estis serĉanta la tiutempajn kalendarojn aŭ gazetojn; la tempo ilin konsumadis strangamaniere, kvazaŭ tiu superprogama kreiĝado de objektoj ligiĝus kun la superprograma tempo kaj kvazaŭ kune kun la malapero de tiu tera periodo neniiĝus ĉio materia, kio estis kreita en tiu periodo. Mia nova amo kun Jadwiga

estis en la tempo, kiam mi estis 22—jara, t. e. ĉirkaŭ la jaro 1900. Mi rimarkis, ke en la Publika Biblioteko ĉiuj gazetoj kaj kalendaroj de 1900 ĝis 1878 malaperis sen postesigno, kvazaŭ disbloviĝinte en malesto. Anstataŭe estis ankoraŭ tiuj, kiuj koncernis la jarojn 1910—1905, sed ankaŭ tiuj laŭvice malaperadis — tiel, ke kiam nun irante en la direkto kontraŭa al la antaŭa ni atingis la jarojn 1905—1910, ĉio ĉi, kio estis povanta atesti pri la potenca kosmosa kataklismo — kvazaŭ nebulo nereala krevadis kaj malaperadis.

La sola (ŝajnas al mi) pruvo nerifutebla pri la efektivo de tiu periodo estas tiu ĉi medaliono elfosita el la tero ĉe la acero en la malnova parko. Kun larmoj en la okuloj kisis Jadwiga tiun medalionon, ateston de nia antaŭa vivado kaj de nia antaŭa amo.

Nun ŝi komprenis ĉion: ĝi ne estis sonĝoj, ĝi estis malnova antaŭekzista nia efektivo; ĝi estis nia facilanimeco, kiu ordonis al ni disiĝi kaj ne plenumi nian feliĉon. Nun ni estis kiel geĉeoj; nun ni komprenis, kion ni devis. Ni devis ĝisfunde eltrinki la neplenumitan pokalon. Ho dolĉa horo de miraklo! Kiel feliĉaj, enĉielaj ni estis en tiu dua vivo! Kiel profundan saĝon sentis niaj koroj, riĉaj je la sperto de l'forpasintaj periodoj!

Ambaŭ do—ŝi kaj mi—fariĝis simpla kosmosa fenomeno por pruvi la grandan kataklismon de nia globo. Mi ricevis de ŝi alian medalionon, kiun mi kun la unua (en la skatolo) konservas por rememoro.

Mi opinias, ke tio estus la plej bela donaco por ia muzeo.

Malgraŭ tio post kelkaj jaroj ni disiĝis — cetere en plena amikeco. Ŝi edziĝis je iu riĉa sinjoro. Kaj mi edziĝis je Mario, persono kun grandaj ecoj de koro kaj animo, tre bela kaj riĉa—kaj mi estus kun ŝi absolute feliĉa, se ne ekzistus mia plej kara bopatrino, kiu ĝis sia morto (en januaro 1910) loĝis ĉe mi. Ni havas du infanojn: Aleĉjo scias jam iradi kaj paroli kaj Jaĉjo aperis en la mondo denove post 64 jaroj de malesto.

Unuvorte, ĉio revenis al normalo—kaj ĉiuj postesignoj de tiu ĉi kolosa kataklismo malaperis senrevene tiel, ke la modernaj astronomoj eĉ ne unu minuton povas aldoni al la normala tempomezuro.

Matematike ili estas pravaj, ĉar se oni adicias:

$$1878 - 1910 = -32, \text{ kaj } 1910 - 1878 = +32,$$
$$\text{do } -32 + 32 = 0 \text{ (nulo).}$$

Ekzakte konsiderante, la kataklismo ne okazis.

Tamen tiu medaliono — tiuj du medalionoj! Kiu do povas malŝati la naivajn donacetojn, kiujn interŝanĝas la geamantoj?

En ĉi tiuj medalionoj troviĝas la nerifutebla pruvo pri la de mi priskribitaj faktoj. Mi ne supozas, ke mi sola estas tiurilate privilegiita; sendube ankaŭ aliaj homoj tiutempaj—la homoj el la periodo de l'kometo—havas pri tio pruvojn. Estas dezirinde, ke ankaŭ ili prenu la voĉon.

*Kun permeso de l'aŭtoro el la pola lingvo tradukis.*

***Br. Kuhl.***

# Libroj kaj Gazetoj.

*John Merchant,*

*Joseph Rhodes kaj la fruaj tagoj de Esperanto en Anglujo.* Esperanten tradukita de Louise Briggs. Eldonita de la Federacio Esperantista de Yorkshire.

Utile estas, trapasinte iun longan kaj penplenan vojon, foje halti kaj turninte sin trarigardi la trapasitan fragmenton; pripensante la renkontitajn malfacilaĵojn, venkitajn barojn kaj falsajn iafoje paŝojn, oni akiras kuraĝon al plua daŭrigo de l'vojaĝo, lernas eviti la malfacilaĵojn kaj fremdajn spertojn utiligas por la propra uzo. Bone tion komprenis niaj anglaj samideanoj kaj tio, flanke de la deziro honori sian preskaŭ unuan migranton sur la komence tiom maldanka vojo de Esperanto, estis la kaŭzo por eldoni la supran verkon. Ĝi priskribas la disvolviĝon de Esperanto en Anglujo depost la komenco, ĝis la unuaj jaroj post la milito en maniero tre interesa kaj leginda por ĉiulanda samideano. Sur tiu fono estas prezentita tipo bedaŭrinde ĉiutage pli malofta de Esperantisto de la unuaj tagoj, en kiuj ĉiujn admirantojn de l'Zamenhofa verko oni povis preskaŭ denombri sur la fingroj de ambaŭ manoj. Tia tipo en Anglujo estis Joseph Rhodes. Karaktero nobla, sentanta ĝojon en servado al aliaj, laboranto modesta kaj persista, avida je ĉiu ideo pliboniga por la homaro, kiam li ekkonis Esperanton, li ekamis ĝin tutforte kaj restis al ĝi fidela ĝis la lasta spiro. Li metis la fundamentan ŝtonon sub la tiel grandioze elkreskinta organizaĵo esperantista en Anglujo, fondante la unuan grupon en Keighley en 1902. Malgraŭ, ke li estis unu el la „spiritus movens“ de angla esperantista movado, li ne prenis sin en la unuajn vicojn, preferis restadi en la ombro. Lia

literatura agado estis ne ampleksa, kvankam por niaj anglaj samideanoj tre grava. La unua granda vortaro esperanta angla devenas el sub lia plumo. Al la eksterlanda samideanaro pli konata li estis pro sia „Vortaro de esperantaj rimoj“, pro kiu ĉiuj rimaĵistoj lin benis kaj kiun ne unu vera poeto, precipe en komenco, opiniis utila.

Jen tipo de tiuj „unuaj“. Kiam oni legas la libron, malgraŭvole rememoriĝas nia pola tipo, atendanta apartan monografion: Antoni Grabowski. Kiam tiu „unua“, kun kiu la Majstro havis la okazon konduki la unuan interparolon en Esperanto, ĝisatendos respondan al sia greveco biografion... Kaj kiom pli ĝi povos esti interesa.

La lingvo de la verko estas pura kaj bona, kvankam iom angla; oni devas al ĝi alkutimiĝi. Eldonita estas la libro tiel, kiel en Eŭropo nuntempe povas nur Angloj eldoni.

***Baroko.***

***Eŭgen Wüster.***

***Maŝinfaka Esperanto-Vortaro prielementa. Maschinentechnisches Esperanto-Wörterbuch der Grundbegriffe.*** Ferdinand Hirt et Sohn, Leipzig 1923.

Kiom ajn malutila por la ĝenerala ideo de l'lingvo internacia estis la Idista movado, gi en unu rilato utilis al la Esperantistaro. Supozante venki per la varbado de scienculoj, ĝi preparadis por ili fakajn vortarojn sen atento, ke tiu laboro estas superflua kaj trofrua, ĉar ne vortaro eĉ la plej riĉa faras la lingvon, sed la popolo ĝin uzanta. Tiu laborado tamen devigis la Esperantistojn, kiuj pli da fortoj dediĉis al pliriĉigo de sia literaturo, turni sian atenton ankaŭ al la kampo de l'scienco. Kaj efektive depost ĉirkaŭ 1910 konstante aperadas aŭ aparte, aŭ en diversaj niaj fakaj gazetoj, vortaretoj kaj suplementoj de diversaj branĉoj de l'scienco. Ilia preskaŭ ĝenerala karakterizo estas, ke ili ne estas kunmetitaj arbitre a priori, sed prezentas plej grandaparte vortojn, uzitajn almenaŭ prove en fakaj artikoloj kaj verkoj. Tiu metodo, kvankam malpli rapida ol tiu de l'Idistoj. havas la superecon, kiu ĉiam karakterizas la praktikon kompare kun la teorio.

Tian tipon de faka vortaro prezentas la ĵus aperinta verko de Eŭgen Wüster. En sia maŝinfaka vortaro li kolektis radikojn elprovitajn de esperantaj verkistoj, uzante por la devenaj ideoj la propran al Esperanto eblecon kunmetadi la vortojn. Oni devas admiri lian profundan konon de l'spirito de nia lingvo, observante la manieron, en kiu li tion faras. La riĉa esprimaro (ĉ. 3600 vortoj) povas

kontentigi ĉiun specialiston de tiu fako kaj esti utila al ĉiu Esperantisto ankaŭ en la ĉiutaga vivo.

Rimarkinda estas la aranĝo de l'vortaro. Por malgrandigi la amplekson kaj per tio malmultekostigi la verketon, la ambaŭ vortaroj (esperanta kaj germana) estas apartaj, t. e. apud la vortoj ne troviĝas iliaj tradukoj, sed la rilataj nombroj de l'paĝoj kaj kolonaj numeroj, ĉe kiuj en la dualingva vortaro la signifo estas trovebla. Tiel la amplekso reduktiĝis preskaŭ ĝis duono. Tiu sistemo havas ankoraŭ ĉi tiun avantaĝon, ke eldonante alilingvajn vortarojn oni ne bezonos plu presi la esperantan parton, nur la nacian, aldonante nur strietojn kun la rilataj nombroj, kiujn oni povos en la esperanta parto surglui por kovri la nombrojn rilatantajn al la germana parto. Estas vero, ke tiu aranĝo posedas ankaŭ la maloportunon, ke oni devas ĉe ĉiu vorto dufoje serĉi, tamen en la malgranda libreto la laboro ne estas tro peniga.

Oni devas deziri, ke la alilingvaj tradukoj baldaŭ aperu, al kio la rimarko sur la tilolpaĝo: Germana eldono,—multe esperigas. *Baroko.*

# Esperanta Kroniko.

STRANGA DECIDO. En majo okazis jarkunveno de 9 delegitoj de pollanda esp. societo „Laboro", dum kiu oni decidis (kiel komunikas № 275 de la ĝeneva „Esperanto"), ke „membroj de „Laboro" ne povas esti samtempe anoj de aliaj societoj, celantaj propagandon de Esperanto en Polio (sic)". Ŝi scivolas, kiaj povis esti la kaŭzoj de tiu konsternanta decido, komparebla nur al la hontinda forpelo de U. E. A. el Bolŝevikujo? Ĉu la estraro de „Laboro" opiniis, ke ĝi havas moralan devon zorgi „pastre" pri minacitaj de burĝa pereo animoj de siaj anoj, aŭ ĉu ĝi nur timis, ke „laboranoj", kiuj apartenus ankaŭ al alia societo, ne parolu nian lingvon pli bone, ol la 9 delegitoj mem? Ĉiuokaze, ni forte esperas, ke la laboranaj „animoj" konsilos baldaŭ al la „pastroj", ke ili okupiĝu estonte nur pri la propra savo.

„LA LUMTURO". Peresperanta politika gazeto tutmonda por la interesoj (sic!) de la homoj. Dusemajna. № 1. 15.8.1923. Eldonanto Johann Fildstedt, Industrie u. Handelsges. „Continental" m. b. H., Bremen, Langenstr. 60 (Germanujo). — Malmodeste eniris la vicojn de nia gazetaro tiu nova „grosse Berthe" de la germana „paca militado" kontraŭ la venkintaj Nacioj. „La popoloj ekkonu" ordonas ĝi, „ke necesa estas plena interkonatiĝo, ĉar multe da malbono en la mondo devenas el nescio kaj malkompreniĝo". La bedaŭrindaj popoloj tion ĝis nun ne sciis, feliĉe tamen troviĝis grandanima komercfirmo Continental, m. b. H., por ilin instrui. En la unua artikolo de unua numero de la novnaskita „Lumturo" (ho, kia titolo!) ĝi okupiĝas pri la afero de kulpo en la pasinta Granda Milito. Kiu do estas kulpa? Germanujo?—Ne!—„Entente" do?—

Certe jes, sed tion oni ne povas jam nun diri, ni provu dume semi iom da malordo en la malamika tendaro: kulpa estas la ŝ t a t a n o, ĉar li obeis sian registaron kaj iris defendi la patrujon. For do la registarojn! for la patrujojn! regu ĥaoso, kaj helpu nin Goethe: „Nur la homaro e n t u t a (s i c !) estas e n v e r o (s i c !) la homo!“— Tiel do aspektas la Continental'a „plena interkomprenigo de popoloj“?... Ne, aminda nova Berthe! Vi ne sukcesos. Ne malŝparu vane tempon kaj monon.

DEKLARO DE „POLLANDA FEDERACIO“. Dum la kongreso en Nürnberg aperis en „Esperanto Triumfonta“ deklaro, eldonita en la nomo de t. n. „Federacio de esperantistaj societoj en Polujo“ (sen individuaj subskriboj), kiu necesigas kelkajn vortojn de klarigo. La kreo de la Federacio, decidita dum la pasintjara pollanda kongreso, estis komisiata al 3 ekzistantaj en Warszawa esp. societoj: grupo Warszawa de Pola esp. societo, societo „Laboro“ kaj rondo „Konkordo“. La kongreso elektis provizoran estraron de F., konsistintan el po 2 membroj de la 3 menciitaj grupiĝoj kaj pluaj 6 personoj el provinco, kiuj pro teknikaj malhelpoj fakte ne partoprenis en la agado. La tuta laboro restis sekve por la varsoviaj membroj, kiuj sole estas pri ĝi respondaj. Bedaŭrinde tamen ilia elekto trompis la esperon: dum sia unujara ekzisto la estraro de F. ne nur alportis nenian utilon al la movado, sed ne kapablis eĉ legaligi ĉe la ŝtataj povoj la organizon. Male, per siaj senpripensaj kaj sentaktaj agoj ĝi ofendis kelkajn eminentajn kaj altmeritajn samideanojn, kio estis kaŭzo, ke post ripetataj senefikaj admonoj, la Pola Esperantista Societo, ne povante plue resti kunresponda pri tiaspeca „laborado“, estis devigata la 6-an de januaro la F. forlasi. Du monatojn poste faris la samon societo „Laboro“. En la estraro de F. restis do fakte nur la 2 membroj, apartenantaj al la rondo „Konkordo“. Oni rajtis supozi, ke post farita malagrabla sperto, ili estos kontentaj senbrue la oficon rezigni kaj lasi la organizadon de Pola Federacio al aliaj, pli taŭgaj manoj. Sed la fatalo efikis ĝisfine. Laŭ jam aplikita metodo, ili ne hontis tiri internan malpacon sur la kampon internacian. Aperis kongresa deklaro pri „paralizado“ de la malfeliĉa dupersona F., kiu tial ne povas inviti la kongreson al Warszawa. Ĝiaj aŭtoroj forgesis nur unu: skribi sub ĝi siajn nomojn. Ne volante esti kruelaj, ni ankaŭ ilin ne citas.

KOMPATINDAJ SATANETOJ. Sub kolerema, maljusta kaj mensogema raporto pri unu el niaj artikoloj en № 39 de „Sennacieca Revuo“ ni trovas jenan devizon: „Ni ne havas sufiĉan forton por sekvi nian prudenton (La Rochefoucauld)“. Tiu senarmiga konfeso liberigas nin de alia respondo.

RICEVITAJ GAZETOJ. Nombroj en parentezo signifas la numeron: Arguso (8—9), Aŭstra Esp. Raporto (4), Belga Esp. (97—98, 99 — 100), Brazila Esp (1 — 5), British Esp. (219, 220, 221), Corriere Balcanico Esp. (21, 24), Esp. Praktiko (54, 55), Esp. Triumfonta (141, 142, 143, 145, 146, 148 ab, 149 ab, 150, 151 ab, 152, 153), France—Esp. (42, 43), Germana Esp. (329, 330 — 31), Holanda Esp. (74, 75, 76, 77, 78, 79, 80, 81, 82, 83, 84, 85), Itala Esp. Revuo (6, 7), Lumturo (1), Marto (6, 7), Revuo Orienta (6), Sennacieca Rev. (39, 40, 41 — 42), Verda Ombro (6 — 7), Ukraina Stelo (26). Enhavas artikolojn pri Esp.: Głos Lubelski (176), Słowo de Radom (170)—ambaŭ polaj—kaj New Jersey Post (36), usona. Krome ni ricevis: Academia pro Interlingua (2).

# KOMUNIKOJ.

## POLA ESPERANTISTA SOCIETO.

## NOVA PREZIDANTO KAJ SEKRETARIO.

Pro intertempa rezigno de S-o D-ro Jerzy Loth, Prezidanto kaj S-o Stankiewicz, Sekretario de la Societo, la 18-an de Oktobro okazis en la loĝejo de la Societo, Królewska 19, Ĝenerala Elekta Kunsido, dum kiu unuanime estis elektitaj: Prezidanto — S-o Redaktoro Stanisław Karolczyk, Sekretario—S-o Inĝeniero Kazimierz Tymiński.

S-o Stanisław Karolczyk naskiĝis en 1890 en Łódź. Li estas unu el la malnovaj Esperantistoj de nia lando, ĉar li aliĝis al nia movado en 1904. Jam en la jaro 1906 li estis kunredataktoro de novfondita tiam en Łódź esperanta gazeto „Juna Penso“. En 1911 aperas en Łódź la „Unuaj Agordoj“—la ĉarma bukedo de originalaj esperantaj poeziaĵoj (preskaŭ plej fruaj en Esperantujo!), kiu rapide diskonigas tra tuta mondo la pseŭdonomojn de siaj aŭtoroj: Eska (Karolczyk) kaj Wiktor Elski (Stanisław Braun).

En tiu tempo, en la vivkondiĉoj de la juna poeto okazas subita skuo: persekutata de la rusa registaro pro sia patriota kaj socia agado li devas elmigri Krakovon, poste Vienon. Pene li baraktas kun materialaj mankoj. En 1912 li revenas la iaman Reĝolandon, ekloĝas en Warszawa kaj fondas ĉi—tie la gazet—kaj anoncoficejon „Promień“ („Radio“). Lia modesta loĝejo tuj fariĝas centro, magnete altiranta ĉiujn varsoviajn fervorulojn esperantajn. Kiomfoje, dum la teruraj militjaroj, ni renkontis tie nian neforgeseblan bardon Antoni Grabowski, interkonsiliĝantan kun Eska pri la tiam entreprenita granda verko — la traduko de „Sinjoro Tadeo“. Karolczyk estis, kiu konvinkis lin pri la eblo plenumi tiun grandiozan taskon (Grabowski mencias tion en sia antaŭparolo al la traduko), Karolczyk, kiu subtenis lin dum liaj hezitoj, konsiladis kompetente en momentoj de dubo. En 1920 Stanisław Karolczyk unu el la unuaj, kiel simpla soldato stariĝas memvole sub la milita standardo por defendi la atakitan Patrujon. Hejmreveninte post la packontrakto, li tuj revenas ankaŭ al sia amata Esperanto. En februaro 1921 li fariĝas Estrarano—Kasisto de Pola Esperantista Societo kaj post unu jaro fermas la budĝeton kun nekutime alta en niaj rilatoj enspezo. De tiu tempo li konstante kunlaboras kun la Estraro. Kiam en la pasinta jaro la granda oferemo de varsoviaj esperantistoj rekreis nian gazeton,

ĉiuj unuanime decidis konfidi al Eska la respondplenan taskon de ĝia redaktado.

Nun la ĝenerala konfido, respekto kaj simpatio vokas lin al la plej alta posteno en pola movado esperanta.

S-o Kazimierz Tymiński naskiĝis en Warszawa, en 1893. En la kuranta jaro li finis plensukcese la arkitektan fakon de Varsovia Politekniko. Li estas Esperantisto de 1905 kaj estis Estrarano de P. E. S. en 1922. Ĉiuj varsoviaj samideanoj konas lian elprovitan fervoron kaj fidelecon al la Zamenhofa ideo.

La Estraro de P. E. S. estas feliĉa saluti en sia rondo tiel eminentajn kunlaborantojn. Ĝi gratulas ilin varme kaj elkore deziras al ili abundajn fruktojn de estonta laboro!

Por la Estraro

*Jan Kostecki* Vicprezidanto.

---

## PRZEKŁADY Z POLSKIEGO NA ESPERANTO.

Dzielimy się z Czytelnikami miłą wiadomością, że zaszczytnie znany na niwie esperanckiej p. Bronisław Kuhl z Krakowa (ul. Batorego 1) dokonał przekładu Nieboskiej Komedji na esperanto.

Żywimy nadzieję, że praca ta znajdzie niebawem chętnego nakładcę, który nada jej godną szatę, pozwalając wkrótce poszczycić się naszą Nieboską przed wielojęzyczną rzeszą cudzoziemców esperantystów.

Przy tej sposobności stwierdzamy, że propozycja nasza zawiadamiania Redakcji o zamierzonych przekładach dała pożądany wynik, bo otrzymany odzew pozwolił nam uprzedzić p. Dra Ignacego Dziedzica, który rozpoczął był przekład również Nieboskiej Komedji na esperanto, o istnieniu takiego przekładu w formie wykończonej.

Zachęceni tem zwracamy się tą drogą ponownie do Czytelników, zwłaszcza zaś do P. P. Zbigniewa Barteckiego w Zakopanem, Stanisława Brauna w Łodzi, Romana Dobrzańskiego w Strzemieszycach, Kazimierza Domosławskiego w Warszawie, Dra Ignacego Dziedzica w Toruniu, Heleny Hemplowej we Lwowie, Bronisława Kuhla w Krakowie, Władysława Mergla w Pradze Czeskiej, prof. gimn. Józefa Orzecha w Inowrocławiu, Włodzimierza Pfeiffra w Łodzi, Czesława Pruskiego w Lublinie, Antoniego Stankiewicza w Warszawie, oraz licznych przyjaciół naszego pisma o łaskawe dalsze komunikowanie Redakcji wiadomości o własnych lub cudzych przekładach gotowych do druku lub w opracowaniu.

---

**Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK**

Redakcio kaj administracio: Warszawa, str. Królewska 19.
Funkcias nur lunde kaj ĵaŭde de 8—10 h. vespere.

Presejo: Wacław Maślankiewicz. Warszawa, Nowogrodzka 17.

CENTRA ESPERANTO-KOMITATO

CENTRA KASO.

10. Oktobro 1923.

# Alvoko al la Esperantistaro.

Financa subteno estas urĝe bezonata por la oficialaj institucioj de la Esperantistaro, nome:

- **Lingva Komitato** (L. K.) kun ĝia **Akademio;**
- **Konstanta Reprezentantaro** de la Naciaj Societoj (K. R.);
- **Universala Esperanto-Asocio** (UEA) kun ĝia Komitato; kaj
- **Centra Esperanta-Komitato** (C. K.) kun ĝia Konstanta Kongresa Komisiono (K. K. K.).

La C. K., kiu zorgas pri la ĝeneralaj interesoj de la Esperanto-movado, starigis **Centran Kason**, kiu enspezas donacojn, kotizojn de kongresoj, kotizojn de naciaj societoj pere de la K. R., kaj subvencion de UEA.

La C. K. petas al la bonvolaj Esperantistoj, ke ili tuj per siaj donacoj provizu por la Centra Kaso sufiĉe da monrimedoj por ĝenerala propagando, por la subteno de la Lingva Komitato kaj la Centra Oficejo en Parizo, kaj por certigi, ke la nova organizo de la Centraj Institucioj havu bonan kapitalon por komenci fruktodonan laboron.

De nun la respondeco por la subteno de la Centraj Institucioj restas ĉe la Esperantista popolo. Do, kiu povas, tiu donu al la Centra Kaso. Eĉ la plej malriĉa ne detenu sin. *Multaj etoj fariĝas egoj*. La grupoj bonvolu organizi periodajn monokolektojn. La naciaj societoj sendu monon al s-o Edmonds, kasisto de la K. R. En la malbonvalutaj landoj oni aĉetu dolarojn aŭ britajn monbiletojn. Bonfaremaj bonhavuloj dediĉu jarajn sumojn al la kaso. Tiuj kiuj tion deziras, rajtas direkti, ke mono sendita estu uzata por L. K., Ĝenerala Propagando, Centra Oficejo en Parizo, UEA, ktp. Se direkto mankas, la Centra Komitato metos la monon en la Centran Kason kaj ĝin dispartigos inter la Oficialaj Institucioj laŭbezone.

Samideanoj, la Oficialaj Institucioj, kiujn vi kreis, ne povas funkcii nur per bonvolo. La Centra Komitato ja bezonas bonvolon, sed ĝi ankaŭ bezonas viajn monoferojn. Ni atendas ilin.

Por la Centra Esperanto-Komitato:

*W. M. Page*, financa fakestro.

31, Queen Street, Edinburgh.

# „Radio-Servo". Esperanto—T. S. F.

Oni sciigas nin, ke grupo de svisaj, italaj kaj alilandaj Esperantistoj kune kun esperanto-amikaj radio-fakuloj laŭ iniciativo kaj sub gvidado de D-ro Paul R u m p e l kreis peresperantan tutmondan „R a d i o-S e r v o n" plenumante tiamaniere la deziron kaj la bezonon de la radiointeresuloj de ĉiuj nacioj.

Oficiala Organo estas la ĉiumonata ilustrita gazeto „RADIO-SERVO", la neŭtrala renkontejo de la diversnaciaj kaj diversa-lingvaj „Senfaden-istoj", internacia informilo kaj organizilo por la radiotekniko, radioindustrio kaj radiokomerco, kaj samtempe progresilo por nia Esperanto-Movado. La „R a d i o-S e r v o" invitas ĉiujn radio-interesulojn kunlabori kun ĝi kaj profiti je ĝiaj servoj.

La C e n t r a—Oficejo de la „R a d i o-S e r v o" en L o c a r n o (Svislando), direktata de nia samideano S-ro Direktoro Armando C a l i, donos voleme ĉiujn pluajn informojn, same kiel la Agentejoj de „R a d i o-S e r v o", organizotaj en la ĉeflokoj de ĉiu lando.

## Polskie Towarzystwo Esperantystów

**zawiadamia swych członków, że kancelarja, biblioteka i czytelnia Towarzystwa czynne są we czwartki od 8 — 10 wieczór. Kursy języka Esperanto prowadzić będzie prof. Mieczysław Kaus.**

Redaktoro kaj eldonanto: S T A N I S Ł A W K A R O L C Z Y K

Presejo: Wacław Maślankiewicz, Warszawa, Nowogrodzka 17.